



Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto
American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

(Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numero 191

ISSN: 0002-7499

marto 2013

Enhavo

AATE Matters

- Peto de nia vicprezidanto1
Retpoŝtadreso de la koresponda sekretario.....1
La jarkunsido de ILEI okazos en Raleigh2

NASK

- William Peace University and Raleigh, North
Carolina warmly welcome NASK 2013!.....2

ILEI

- Ĉu vi partoprenos la ĉi-jaran konferencon?.....3
Novajara saluto de la prezidanto de ILEI3

Instruado

- Nova kurso kreita de AAIE-ano Joe Blum.....4
Nova versio de Lernu.net baldaŭ lanĉota4
Edukado.net raportas pri sia laboro en 2012 ..5
Article about Esperanto appears in the study
guide for the California High School Exit
Examination5
Agado de niaj membroj.....5
Internacia kurso por instruistoj6
Esperanto kaj instruado viglas en Burundo.....6
Vidu pli da informo en nia retejo aaie.us7
Kalendaro8

Informo kaj invito al la 46-a konferenco de ILEI ...9

- Course report form10
Membership form.....11

Aferoj de AAIE

Peto de nia vicprezidanto

Kara amiko,

AAIE (la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto) estas VIA organizaĵo por antaŭenigi la instruadon de Esperanto en Kanado kaj Usono. Ni bezonas vian subtenon!

Unue, ni bezonas vian membrecon! Se vi ankoraŭ ne pagis por re-aligi en la jaro 2013, vi povas fari tion aŭ:

- ★ per papera aliĝilo kaj ĉeko perpoŝte al Doroteo HOLLAND, aŭ
- ★ per kreditkarto ĉe <http://www.esperanto-usa.org/retbutiko>

Due, ni bezonas vian informon. Se vi instruas Esperanto-kurson (aŭ konas pri Esperanto-kurso), bonvolu informi nin aŭ pere de nia retejo ĉe http://www.aaie.us/wordpress/?page_id=113 aŭ per la formularo sur la antaŭlasta paĝo de ĉi tiu *Bulteno*.

Trie, ni bezonas vian energion kaj partoprenon. Nia retejo estas <http://www.aaie.us> kaj la retpaĝo de ILEI estas <http://ilei.info>

Se vi NE volas re-aligi en la nuna jaro, bonvolu kontakti min pri viaj kialoj. Kaj se vi havas iujn ajn demandojn aŭ komentojn, nepre kontaktu min!

Ĉion bonan al vi,
Ĝeremio ALDRICH, Vicprezidanto de AAIE
gxeremio@gmail.com

NdIR: Post malpli ol monato necesos informi ILEI pri la nombro da membroj por 2013, do bonvolu remembriĝi kiel eble plej baldaŭ!

Retpoŝtadreso de la koresponda sekretario

Bonvolu rimarki, ke la nuna ĝusta retpoŝtadreso de nia koresponda sekretario, Dorothy Holland, estas dorothyh77@gmail.com. (Pro eraro, malnova adreso aperis en la lasta numero.)

Redaktoro: Gary Grady, 3119 Lassiter St, Durham NC 27707-3888 USA <Gary@DGaryGrady.com>

Prezidanto: Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>

Vic-Prezidanto: Jeremy Aldrich <gxeremio@gmail.com>

Eduka Sekretario: Gary Anderson <ganderson@SeattleAcademy.org>

Koresponda Sekretario: Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521 USA <dorothyh77@gmail.com>

Kasisto: Chuck Mays <charles.o.mays@gmail.com>

<http://aaie.us>

<http://ilei.info>

La jarkunsido de AAIE okazos je la 7-a de julio en Raleigh

La jarkunsido de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto okazos kiel kutime kadre de la kongreso de Esperanto-USA, tre probable dimanĉon, la 7-an de julio.

Ĉi-jare, la 61-a Landa Kongreso de Esperanto-USA okazos de vendredo vespere, la 5-a de julio 2013, ĝis lundo tagmeze, la 8-a de julio, 2013, ĉe la Universitato William Peace en Raleigh, ĉefurbo de Norda Karolino. NASK okazos en la sama loko tuj antaŭ la Landa Kongreso. (Vidu sube.) Ĉio okazos en konstruaĵoj tre proksimaj unu al la aliaj, kun 1-2 minutaj promenoj inter ili.

Dum la Kongreso okazos kelkaj programeroj rilate Esperanto-instruadon, inkluzive sesiojn organizatajn de AAIE kaj de Esperantic Studies Foundation (ESF). Se vi volus kontribui al la programo, bv skribi al Chuck Mays aŭ Gary Grady (adresoj sur la unua paĝo).

Por aliĝi al la kongreso, vi povas uzi la formularon en ĉi tiu *Bulteno* aŭ viziti <http://esperanto-usa.org/retbutiko>. Bonvolu zorge legi la formularon por pli da detaloj pri la kotizoj, manĝoj, ekskurso, ktp. La retejo por la kongreso troviĝas ĉe <http://e-usa-kongreso.org>

NASK

William Peace University and Raleigh, North Carolina warmly welcome NASK 2013!

NASK presents a short session, this time in the heart of beautiful Raleigh, North Carolina's capital city. Arrive on June 26th and depart on July 5th—for eight days of learning, fun, and exploring the city's wonderful museums, varied restaurants and shopping, and various seats of government, all within walking distance of the Peace campus.

Founded in 1857 as Peace Institute, offering education for boys and girls in primary grades and to women from high school to college, the school is named in honor of William Peace, a Raleigh businessman and church elder, who pledged \$10,000 to the Rev. Joseph M. Atkinson in trust for the First Presbyterian Church. The gift was used to establish Peace Institute.



The Civil War interrupted construction of the University's Main Building (pictured above) when it was used by the Confederate government as a military hospital. After the war, the Federal government used Main as the North Carolina headquarters for the Freedmen's Bureau, which helped former slaves establish new lives, and it is for this role in the Federal government that the building is named on the National Register of Historic Places. Peace Institute opened in 1872 and by 1940, Peace offered an academic program for young women that encompassed the last two years of high school and the first two years of college. Peace College, which by the 1980's had become a junior college for women entirely, transitioned into a four-year baccalaureate degree-granting institution during the mid-1990s, awarding its first baccalaureate degree in 1996. Additionally, Peace began offering coeducational evening courses through the William Peace School of Professional Studies in 2009.

In 2011, the Board of Trustees voted to transition the institution from single-gender to coeducational and rename the institution William Peace University.

NASK students will reside in an air-conditioned residence hall within one to two minutes walking distance of the classroom building, and will share a four-person suite: two participants per bedroom share a restroom. A linen package will be provided to all guests which includes two flat sheets (twin-sized bed), light blanket, pillow, two towels, two washcloths, small disposable cup and small soap. It is recommended that guests bring comfort items such as small reading lamp, alarm clock, heavier blanket or quilt, if desired, and clothes hangers. The residence hall contains a comfortable lounge on each of its three floors with a television and upholstered seating, and a kitchen with refrigerator and microwave is located on the first and third floors. The residence hall is equipped with

complimentary laundry facilities, also.

Complimentary access to the Internet is available via the University's wireless guest network throughout campus. The dining hall is a pleasant one-minute walk from the residence hall and classroom building, and the caterer serves a variety of delicious options at each meal from which to choose. Vending machines located around campus are coin-operated and offer a variety of snacks and Coca-Cola beverage products.

The international team consisting of István Ertl (Hungary), Derek Roff (U.S.), and Lee Miller (U.S.) will provide three levels of instruction. Hoss Firooznia will serve as an assisting teacher and will organize extracurricular activities.

This year, students can remain after NASK in order to participate in the Esperanto-USA convention July 5-8th (same classroom building and residence hall). If you would like to participate in the Esperanto-USA convention, please be sure to make the necessary arrangements at www.esperanto-usa.org

The general fee for NASK 2013 (courses, lodging and meals) is: US\$ 625.00 until March 22nd, and US\$ 675.00 thereafter. Locals not needing housing have the option of US\$320 course fee only with lunch or US\$250 course fee only with no meals. Scholarships are available for full-time students and teachers, and also for residents of Latin America.

Please contact Ellen M. Eddy, the administrator, at eddyellen@aol.com. For more information, please visit <http://esperanto.org/nask/>

William Peace University's mission is to prepare students for careers in the organizations of tomorrow. On average, more than 90 percent of the university's graduates are placed in jobs or graduate school within one year of graduation.

ILEI

Ĉu vi partoprenos la ĉi-jaran ILEI-konferencon?

La 46-a konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj instruistoj okazos en Herzberg am Harz, meze de Germanio, de la 12-a ĝis la 18-a de julio. Vidu pli detalan anoncon sur paĝo 9 kaj ĉe la retejo <http://ilei.info>.

Se vi planas partopreni la konferencon, bv informi prezidanton Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>.

Ekde 2006 Herzberg am Harz oficiale nomas sin "die Esperanto-Stadt" ("la Esperanto-urbo"), kiel vi povas legi en

la urba retejo ĉe <http://www.herzberg.de>

Laŭ konsilo de kelkaj spertuloj pri vojaĝado, la plej bonaj datoj por aĉeti internaciajn flugbiletojn estas 3-4 monatoj antaŭ la vojaĝo (preferinde meze de la semajno). Do nun estas bona tempo por pripensi viziton al Herzberg!

En 2014 la konferenco de ILEI okazos en Montevideo, Urugvajo dum la semajno antaŭ la UK en Buenos Aires (Bonaero), Argentino. Pli da detaloj poste haveblos.

Novajara saluto de la prezidanto de ILEI

Karaj!

Dum mi verkas, la unuaj dolĉaj sunradioj karesas la orientan marbordon de mia kara hejmlando, Novzelando. Tempo por antaŭenrigardi al 2013.

Pluraj el ni tra novjaraj tagoj mezvojas en streboj reloki la instruadon kaj edukadon kerne en la movado, alivorte ĉe

UEA, tiel ke ĝi ne plu estu nur la tasko kaj okupiĝo de la modesta sed admirinda ILEI. De instruistoj, ni ja bezonas la fakan kontribuon, sed konstrui la strukturon por tio devas esti tutmovada misio.

Ni nun laboras detaligi la sekcion pri 'Kapabligo' ene de la Strategia Vizio, por ke ĝi pretu por la delonge bezonata

nova tutmovada plano. Ni identigis tie kvar strategiajn prioritatojn:

- ★ Intensigo kaj modernigo de ĉiuspecaj kursoj, kune kun oficiala ekzamena oferto.
- ★ Eduka programo por plispertigi, efikigi kaj kunlaborigi niajn ŝlosilajn movadajn agantojn – redaktorojn, informadistojn, landajn kaj fakajn agantojn...
- ★ Kunigi kaj ampleksigi la nunajn ofertojn pri instruista trejnado al kohera skemo, kiun ekstera instanco pretos oficialigi.
- ★ Restarigo de serioza programo de eksteraj rilatoj en edukaj randoj.

En tiu konstruado, reunigo de la lernantoj kaj la instruistaro ege necesas. Novaj junaj varbitaj instruistoj havas la modernajn sciojn kaj kapablojn pri la nuna stato de lingvo-instruado. Nia movado urĝe bezonas tion.

Mia novjara saluto al ILEI en la unua numero de nia organo IPR (Internacia Pedagogia Revuo) signife malsamos kiel la nuna, ĝi resumos atingojn de la lastaj kvar jaroj, kaj tamen portos gravajn novaĵojn pri la sekvo.

Kiu celebras novjaron nun, levu la ĉampanajn aŭ aliajn glasojn, kaj tintu je nova jaro, en kiu ĉi tiu vizio komencos realiĝi, kaj kiu malfermos novan epokon!

*Stefan MacGill
Prezidanto de ILEI*

Instruado

Nova Esperanto-kurso kreita de AAIE-ano Joe Blum

Nun havebla en la retejo de AAIE (<http://aaie.us>) sub la menu-elekto “Instruiloj” estas tre belaspekta nova Esperanto-kurso kreita de **Joe Blum**. Ĝi estas uzebla por lernantoj de ĉiuj aĝoj, eĉ eble kelkaj infanoj en la unua klaso. Instruisto povas adapti la enhavon al la kapabloj de la lernantoj kaj aldoni taŭgajn lernilojn (ekzemple de Edukado.net) kaj lernolibron, aŭ eble rekurson de Lernu.net aŭ la videokurson *Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo*,

depende de la kapabloj kaj bezonoj de la lernantoj. Ni dankas al Joe pro permeso aperigi ĝin en la retejo kaj ankaŭ en la *Bulteno* por tiuj, kiuj ricevas la Bultenon surpapere.

Ni kunsendas kun la presita *Bulteno* la unuan parton. La tuto haveblas de la retejo en la formato PDF, taŭga por presado prefereble en koloroj. Jen ligo al la paĝo pri la kurso:

http://www.aaie.us/wordpress/?page_id=278

Nova versio de Lernu.net baldaŭ lanĉota

Peto de la teamo de lernu.net

Kiel vi eble jam scias, lernu.net baldaŭ lanĉos novan version de la retejo: kun multaj novaj materialoj kaj nova kurso. Pro tio nun kiel neniam antaŭe lernu! bezonas helpon de esperantistoj, kiuj pretas esti volontulaj tradukistoj ĉe lernu!: el preskaŭ tricent tradukistoj, nur ĉirkaŭ trideko fakte estas aktivaj. Estas facile esti parto de nia teamo: simple vizitu la retpaĝon http://lernu.net/pri_lernu/kunlaborantoj/tradukantoj.php. Ni tre bezonas tradukistojn al la angla!

Se vi volas pli da informoj, kontaktu teamo@lernu.net. Detala gramatiko de Esperanto nun estas tradukata nacilingven, kaj baldaŭ estos tradukeblaj tekstoj por la nova kurso. Kunlaboru kun ni por pretigi la novan lernu! por lanĉo!

— Joel kaj Ĵenja Amis, nome de la teamo de lernu!

Tradukistoj por kelkaj lingvoj bezonataj por reklamfilmo pri Lernu.net

Alia retmesaĝo de la lernu!-teamo aldonas:

Kiel eble vi jam scias, post iom da tempo lanĉiĝos nova lernu!, kun nova kurso kaj servoj! Samtempe kun la plibonigoj al la retejo, ni ankaŭ volas ke lernu.net havu pli da uzantoj ĉie en la mondo, kaj por tio ni faros reklamkampanjon. Ni uzos la bonegan reklamfilmeton por

lernu! fare de unu el niaj uzantoj, tre talenta Daniel Voss el Germanio, kiun li kreis en la germana lingvo okaze de la registriĝo de 100-mila uzanto. Vidu ĝin ĉe

<http://youtu.be/1j1hJO7SsOo> (traduko estas sube).

Jam estas germana, angla, hebrea, itala, sveda, portugala, ĉeĥa kaj eĉ kurda versioj! Sed el la grandaj lingvoj mankas hispana, rusa, litova, ĉina, franca, hungara kaj pola (aliaj lingvoj ankaŭ bonvenas!). Por partopreni, skribu al Daniel (sciuro@online.de)—indiku en la titolo de la mesaĝo, kiun lingvon kaj kiun voĉon vi ŝatus fari (por ĉiu lingvo estas kvar voĉoj, du viraj: unu pli juneca, unu pli maljuneca—farata de viro pli ol 60-jaraĝa), unu virina kaj unu infana (6-10-jaraĝa, en la originala filmeto estas knabino, sed povas esti ankaŭ juna knabo). Vi povas fari tion en via loka grupo—jen bona projekto por via sekva renkontiĝo! La formato de voĉ-dosiero estu prefere MP3.

Jen traduko de la filmeto:

Virino: “Mi estas iom timida kaj ĉiam faris tion sola hejme.”

Viro: “Mi ĉiam kredis, ke mi estas la ununura kiu faras tion.”

Knabino: “Mi ne sciis, ke tio estas ankaŭ por infanoj.”

Maljunulo: “Io tia ne ekzistis en la pasinteco.”

Viro aŭ virino: “Lernu.net—ĉi-tie la tuta mondo lernas Esperanton. Dividu tiun videon kun viaj amikoj kaj invitu ilin al lernu!”

Edukado.net raportas pri sia laboro en 2012

Detala raporto pri la lastjara agado de Edukado.net nun haveblas en PDF-a dosiero de la jena retadreso:

<http://www.edukado.net/biblioteko/dosierujo?iid=207>

(Necesos ensaluti per via uzantonomo kaj pasvorto por akiri ĉi tiun aŭ alian dosieron de edukado.net, sed registri estas tute libera kaj senpaga. Edukado.net postulas ensaluton simple por mezuri la uzon de la retejo—vidu la raporton mem por pli da klarigo.)

Edukado.net estas retejo kiu provizas enhavon utilan por instruistoj de Esperanto, kaj ankaŭ por progresantoj. Troviĝas tie ekzercoj, ludoj, afiŝoj por klasĉambroj, filmetoj, informo pri lingvoekzamenoj, kursoj pri aliaj temoj en Esperanto, ktp, entute 758 lerniloj laŭ la raporto. Membroj povas ankaŭ komuniki pere de mesaĝoj en la retejo.

La direktoro de la projekto estas Katalin Kovats, kiu faris interesan prelegon pri Edukado.net rekte el sia hejmo pere de reta vidkonferenco dum la lastjara kongreso de Esperanto-USA.

Laŭ la raporto, dum 2012 Edukado.net akiris pli ol 500 novajn registritajn membrojn. Fine de la jaro estis entute 2772 membroj el 114 landoj. Dum tipa tago ensalutas cirkaŭ 50 membroj.

Fine de la jaro la plej granda nombro da membroj loĝis

en Francio. Sekvis Brazilo, Usono, Hungario, Germanio, Pollando, Hispanio, Rusio, Italio, Belgio, Nederlando, Ĉinio, Britio, Kanado, kaj Japanio.

Dum 2012 oni plibonigis kaj pligrandigis la enhavon de Edukado.net kaj ankaŭ lanĉis paĝon ĉe Facebook por reklami ĝin.

En junio 2012 okazis pro iniciato de Edukado.net la Unua Tutmonda Ekzamentago dum kio preskaŭ 400 homoj trapasis Esperanto-ekzamenojn en 29 lokoj en 21 landoj. Oni planas okazigi Duan Tutmondan Skriban Ekzamensesion je la 8-a de junio 2013 pere de la helpo de kluboj kaj lokaj grupoj tra la mondo. Pri la ekzamenoj mem respondecas UEA kaj ELTE-ITK, la Supera Fremdlingva Trejnejo de la Universitato Eötvös Loránd (ELTE) en Hungario. (La mallongigoj ELTE kaj ITK fontas en la hungara.)

Aliaj projektoj por la nova jaro inkluzivas metodikajn kursojn kaj seminariojn por instruistoj en diversaj lokoj,

Finance sponsoras ĉefe la Esperantic Studies Foundation, kun subvencioj ankaŭ de UEA kaj diversaj aliaj organizaĵoj—lokaj, fakaj, kaj landaj—kiuj donacis entute preskaŭ 31 000 eŭrojn. Ankaŭ pli ol 290 individuoj kune donacis pli ol 3000 eŭrojn.

La 9-paĝa raporto enhavas multe pli da informoj, statistikoj, kaj grafikoj. Pri la enhavo de la retejo mem, indas esplori ĝin rekte.

Article about Esperanto appears in the study guide for the California High School Exit Examination

A practice test found in the English Language Arts Study Guide for the California High School Exit Examination includes questions based on a short article about Esperanto titled “A Universal Language.”

A PDF file of the booklet can be found at the California Department of Education website here:

<http://www.cde.ca.gov/ta/tg/hs/elaguide.asp>

You can download the entire booklet from the page above or just the section labeled “Practice Test” which contains the reading passage in question.

The article runs a little over two pages as printed and is a reasonably good description of Esperanto. It explains for example that “Zamenhof did not envision his language as one replacing all other languages but instead as one spoken as a second language by people around the world. In addition to travelers, Esperanto could be useful for anyone wanting to learn more about other cultures. In fact, people

from all around the world come together at Esperanto conventions, where the communication barrier is broken because everyone speaks the same language.”

It goes on to describe Esperanto as “easy to learn,” and it includes a succinct description of the grammar.

“Despite Esperanto’s seeming lack of popularity,” the text asserts, “it is estimated that several million people speak the language,” and it concludes, “Perhaps in the future, Esperanto will find its place as a widely used and accepted universal language.”

The study guide was published in 2008, but it apparently is still in current use, so apparently many high school students in California—the most populous U.S. state—are exposed to information about Esperanto in the course of preparing for their high school exit exam.

Thanks to Enrique Ellemberg for pointing this out.

Agado de niaj membroj

Nia prezidanto **d-ro Ron Glossop** prelegis pri Esperanto ĉe la Mez-Ŝtata Konferenco de Instruistoj de Fremdaj Lingvoj je la 9-a de marto en Milwaukee, Viskonsino, kaj ankaŭ ĉe la Nord-Karolina Konferenco de Instruistoj de

Fremdaj Lingvoj je la 13-a de Oktobro en Winston-Salem, Norda Karolino.

Ellen Eddy, **Hoss Firooznia**, kaj **Chuck Mays** helpas organizi la ĉi-jaran NASK-on, kie instruos **Derek Roff**, Lee

Miller, kaj István Ertl.

Hoss Firooznia redaktas la revuon *La Usona Esperantisto*, organo de Esperanto-USA. Hoss ankaŭ instruis dum kvar monatoj ne-oficialan kurson pri Esperanto al kvin komencantoj en la Universitato de Rochester en Novjorko. La kurso kunvenis ĉiusemajne kaj uzis la videokurson

Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo. Pli da informo legeblas ĉe <http://esperanto.lodestone.org>

Gary Grady verkas por *La Usona Esperantisto* rubrikon pri instruado sed planas paŭzi ĝis post la Landa Kongreso pro laboro tiurilate.

Internacia kurso por instruistoj

La Universitato Adam Mickiewicz (Poznań, Pollando) kune kun ILEI kaj Edukado.net ofertas plejparte retan unu-jaran kurson por la trejnado de instruistoj de Esperanto. La studentoj devas viziti la universitaton por intensaj instruesoj dum du apartaj semajnoj, de la 14-a ĝis la 20-a de septembro 2013 kaj de la 1-a ĝis la 7-a de februaro 2014.

Intertempe ili studos hejme kun reta kontakto kun la instruistoj. Fina ekzameno okazos en septembro 2014. Studentoj devas havi bonan lingvokapablon en Esperanto kaj bazan konon de la Esperanto-kulturo. Tiuj, kiuj sukcese finos la kurson ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

Vidu: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

Esperanto kaj instruado viglas en Burundo

La Asocio Nacia por Esperanto en Burundo (ANEB) kaj la Burunda ILEI Sekcio (BIS) raportis lastatempe pri Esperanto-agado en la Respubliko de Burundo, lando en orienta Afriko inter Ruando, Demokratia Respubliko Kongo, kaj Tanzanio. (Dankon al Doroteo Hollan pro la atentigo pri ĉi tio.) Jen la raporto:

2012 estis la jaro je kiu la asocio havis multajn laborojn (konstruado de la biblioteko; starigado de kluboj en aliaj lernejoj; okazigo de la seminario en Rumonge; vizitoj de kluboj, ktp) kaj unu el la sukcesoj estas partopreno de nia Prezidanto en UK kaj IJK en Vjetnamio.

Per la instrusekcio (BIS), ni sukcese organizis kursojn por komencantoj/progresantoj kaj renkontiĝojn en diversaj regionoj de Burundo. Instruistoj de ANEB gvidis kursojn de Esperanto en lernejoj kiel Gasanda, Bubanza, Ngozi, Nyanza-Lac, Gitega, Makamba, Kayanza, Bujumbura, Buyengero, Nyamibu, Kibasha, Kiremba, Bururi, Rutana, ktp. Kursoj normale okazis en multaj kluboj de la lando, kaj en Bujumbura, Gasanda, Rumonge, Kibasha, Nyamibu la gelernantoj faris E-ekzamenon kaj ricevis atestilon/diplomon.

ANEB disponigis materialojn al kelkaj instruistoj kaj pro la nesufiĉo de financoj, ni ne sukcesis kontentigi ĉiujn petojn. Tamen, restis kontaktoj kun ĉiuj kluboj, malgraŭ ke nia granda atento turniĝis al la konstruado de la centro.

Instruado okazis en la universitato de Burundo (instruis Zabulon NTIDENDEREZA) kaj en granda laga universitato, kampuso Kiremba (instruis Jusin NTAKIRUTIMANA). En aŭgusto 2012, ANEB organizis kaj okazigis seminarion en Rumonge. Kvindek esperantistoj el diversaj provincoj ĝin partoprenis. Dum unu semajno, ĉio estis plenplena de kunlaboro kaj amikeco flanke de ĉiuj. Ĝi estis agrabla studperiodo kaj la instruado ege taŭgis. Ĉiuj partoprenantoj certe reiris hejmen kun iom da energio por la daŭrigo de la instruado de Esperanto en kluboj. Ni tute dankas la "Fondaĵon Hans", kiu subvenciis la tutan seminarion kaj ni certas ke ĝi havos postsekvaĵo. Per raportoj el Ngozi, Bubanza, kaj Bujumbura, jam montriĝis ke la seminario estis sukcesa.

Kadre plifortigi la regionan movadon, ANEB sendis instruiston al Kenio kaj lia agado estis tre sukcesa. ANEB

planas sendi alian kaj ĉi-foje, KES devas akcepti kovri ĉiujn kostojn ĉar ekvidiĝas ke kotizoj de ANEB ne estas sufiĉa. Kluboj de Bubanza ricevis subvencion (pruntodono por financi projekton pri bredado de kaproj).



La Prezidanto de JEBUO estis invitita al Radio Salama kadre de 125 jaroj de Esperanto kaj parolis pri la celo de Esperanto kaj ĝia evoluo. La programo estis dissendita dum 3 tagoj. Rimarke; ĉi-jaron, ni ne multfoje vizitis radioelsendejoj. La 3-a nacia kongreso ne okazis pro manko de rimedo sed ni klopodas trovi rimedon por ke ĉi kongreso okazu; indas renovigi la estraron de ANEB.

Karaj amikoj, kun la monhelpo de la fondaĵo "Esperanto en evoluo", ANEB konstruas bibliotekon en Rumonge. Ni nun estas je la fino de la laboro. La problemo estas, ke nia konstruado ne regule venas labori. Sed, li vere certigis al ni, ke li finos la bibliotekon. Ni dankas ĉiujn donancantojn de nia valora projekto kaj precipe dankas niajn geedzojn

Svetlana kaj Johan, la iniciatoroj de la projekto. Por riĉigi nian bibliotekon, ni jam komencis peti librojn al esperantistoj kaj asocioj. Ni ankaŭ alvokas vin helpi nin ricevi librojn esperantaj kaj neesperantaj.

Por viaj informoj, la konstruaĵo en Rumonge konsistas el la oficejo de ANEB, ĉambro por vizitantoj, Stoketo, ĉambro por libroj, legejo. Ni planas konstrui ankaŭ du klasĉambrojn.

Plano por 2013

- ★Plifortigi la Burunda ILEI Sekcio
- ★Sendi instruiston al Kenio
- ★Plifortigi la instruadon en lernejoj
- ★Starigi klubojn en Rutana kaj subteni tieajn esperantistojn
- ★Partopreni en internaciaj kunlaboroj
- ★Peti librojn por la biblioteko
- ★Organizi kongreson en aprilo se rimedoj tion permesos

*Hassano NTAHONSIGAYE
Sekretario de ANEB kaj Sekciestro de BIS*

Aneksa

Saluton. Mi ĝojas raporti ion pri evoluo de esperanto agado en Ngozi. Nun estas 5 instruistoj en la provinco. ĉiu instruisto jam ekinstruis. En Lycee GASHIKANWA respondecas Diane NSHIMIRIMANA. Sxi jam havas 11 gelernantojn (6 knabinojn kaj 5 knabojn). En Lycee communale de CAGURA respondecas Thierry SERUKAMVYE. Li havas 33 gelernantojn (24 knaboj kaj 9 knabinoj). En Lycee de la COMIBU gvidas kurson Lionel IRAKIZA. Li instruas Esperanton al 10 lernantoj (ĉiuj knaboj). Mi kaj mia kolego Diallo NDAYISHIMIYE zorgas pri la instruado en la universitato: nun multaj ŝatas lerni sed ne estas facila ĉar ne estas ekzamena periodo. Ni diras al ili atendi post ekzamenoj. En la universitato jam klubaniĝis 27 studentoj (22 knaboj kaj 5 knabinoj). Jen kiel estas la movado en la Ngozi provinco. Ni bezonas vian vizitadon por ke eĉ novaj esperantistoj vidu ke ili ne estas solaj. Ni ankaŭ petas la statuton de ANEB por krei la centran klubon de la provinco.

Amike Gilbert

Saluton karegaj samlingvanoj!

Karaj, mi ĝojas informi al vi ke la disdono de atestiloj okazos ĉi-dimanĉon ĉe Rohero Komunumo apud Lycee Culturelle Islamique (Markaz) je la 16-a horo. Ni disdonos la duan diplomon al 6 knaboj kaj 4 diplomojn al 2 kanaboj kaj 2 knabinoj.

Karaj, la festo gravas ĉar estos skeĉoj, poemoj, ktp. Oni trinkos kaj manĝos, sed mi petas al ANEB librojn kiel donacoj al tiuj gelernantoj! Bonvolu ankaŭ sendi al mi la flagon!

Samideane, M.Said

Sinjoro prezidanto de ANEB,

Mi kun granda honoro skribas al vi tiun ĉi tiun leteron petanta al vi esti membro de ILEI.

Efektive, sinjoro prezidanto, mi lernis Esperanton ekde la jaro 2001 ĝis 2005 ĉe CIYA porpastra malgranda seminariejo. Tie estis la Esperanta klubo nomata Dia Patrino E-Klubo kaj ĝis nun tiu ĉi klubo funkcias bone.

Post miaj lernadoj ĉe CIYA, mi daŭrigis ĉe BUBANZA Liceo kie mi starigis mian unuan klubon nomatan HIRUNDO Esperanta klubo. Tiu ĉi ago okazis ekde la jaro 2005 ĝis 2009. Tie mi estis kun sinjoro BUTOYI Fabien. Li partoprenis ĉe la seminario de Thereza Kapista kaj li akiris sian diplomon. Dum la jaro 2010 okazis la esperanta seminario. Tie mi partoprenis kaj mi akiris mian instrukapablan diplomon.

Post akiri tiun ĉi diplomon, mi kun sinjoro Eric NIYINZANIYE (kiu nun reprezentas ĉiujn Esperantistojn de BUBANZA) starigis 6 esperantaj klubojn kiuj estas la sekvantaj laŭ diversaj lernejoj kiuj estas en Bubanza Provinco:

GISOVU E-Klubo (GISOVU Liceo)

E.T.B. E-Klubo (BUBANZA Teknika lernejo)

BUBANZA komunuma mezlernejo Liceo E-Klubo (Bubanza komunuma mezlernejo)

RUVUMVU E-Klubo (Ruvumvu bazlernejo)

CIYA liceo E-Klubo (CIYA liceo)

KIVYUKA E-klubo (Kivyuka Liceo).

Post tiu ĉi fruktodona agado, mi daŭrigis miajn studojn ĉe la Burunda Universitato kie mi starigis du esperantaj klubojn. La unua ĉe la Burunda Universitato (nomata Nukso Esperanta Klub), La alia ĉe la Alta Lernejo (nomata Laborema Esperanta Klub) kaj ĝis nun ili ĉiuj bone funkcias. Dum la jaro 2011 okazis esperanta seminario ĉe RUMONGE. Tie estis Mirejo Grosjean la nuna prezidanto de ILEI. Mi partoprenis kaj post la ekzameno mi akiris la Esperantan internacian Diplomon (Meza nivelo: C1). Dum tiu ĉi jaro 2012 ekde la 24-a de aŭgusto ĝis la 30-a okazis la studseminario ĉe RUMONGE tie partoprenis la esperantistoj venantaj de diversaj provincoj. Tie mi partoprenis kiel instruisto. Ni formis esperantistojn kiuj akiris instrukapablajn diplomojn kaj kiel estis la temo "INSTRUISTO POR CIU LERNEJO." Ili starigos klubojn kie ili loĝas kaj lernas. Ĝis nun mi daŭrigas instrui Esperanton ĉe Bubanza kiel ĉe la Burunda Universitato. Tiel, mi helpas divastigi kaj fortigi la Esperantan movadon en Burundo. Kiel mi de longe deziris. Mi volus aliĝi al ILEI. Tiel, mi petas al vi akcepti al mi tion kaj mi akceptas respekti normojn de tiu ĉi organizo.

Esperante la favoran respondon al mia petado, mi petas al vi, Estimata prezidanto de ANEB, akcepti mian deziron kaj proponon, multege respektataj.

Elkore dankon antaŭe.
NTIDENDEREZA Zabulon

Vidu pli da informo en nia retejo aaie.us

Ne forgesu viziti nian retejon ĉe <http://aaie.us> por pli da aktuala informo pri la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, Esperanto-instruado, ktp. Ni laŭgrade plibonigas

kaj pligrandigas ties enhavon. Ni kompreneble bonvenigas sugestojn, korektojn, plendojn, ktp. Simple elektu la ligon "Kontakti nin" de la menuo aŭ supre aŭ dekstre de la paĝo.

Kalendaro

2013

10 – 16 januaro

Jarkongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio en Auckland. La programo enhavas ekskurson en la belan pejzaĝon de Auckland. Informo: <http://bit.ly/U1jMEJ>

18 – 22 januaro

48a Brazila Esperanto-Kongreso en Barra do Garças, MT Brazilo. Ĉeftemo: “Esperanto, Kulturo kaj Turismo: Alternativoj por verda ekonomio”. Informo: <http://bitly.com/Tsluyr>

19 januaro – 21 Februaro

Esperanto-Insulo II en Hajnano, Ĉinio. Kursaro kun tri sekcioj, por komencantoj, por Esperantistoj kiuj volas lerni kiel instrui en Ĉinio kaj alilande, kaj por spertaj Esperantistoj kiuj volas studi kurson de la Universitato de Esperanto, plejparte pere de televida kurso kaj posta diskutado. Informo: <http://www.esperanto-insulo.info>

5 – 8 aprilo

Indonezia Esperanto-kongreso en Bogor, Indonezio. La unua Indonezia Esperanto-Kongreso okazos en Wisma Abdi, Bogor. La fokuso de la kongreso estos je lernado, ekzamenado, kaj kreo de nacia asocio. *Instruistoj kaj ekzamenantoj eksterlandaj sercataj!* Informo: <http://bit.ly/RFJiiT>

18 – 22 aprilo

7-a Azia Kongreso de Esperanto en Jerusalemo, Israelo. Informo: <http://www.esperanto.org.il/ak2013.html>

3 – 5 majo

72-a Hispana Esperanto-Kongreso en Zaragoza, Hispanio. Temo: Lingvo kaj sento — “Jen la temo kaj mot(iv)o de nia kongreso, laŭ la difino de Esperanto farita de K. Kalocsay.” Informo: <http://www.esperanto.es/kongreso>

10 – 12 majo

Brita Kongreso 2013 en Ramsgate, Britio. Laŭnome Brita Kongreso sed pro la proksimo de Ramsgate al La Kontinento, efektive 3-landa Markola kongreso. *Gastoparolanto la kuratoro de Edukado.net, Katalin Kovats.* Informo: <http://britakongreso.org>

17 – 20 majo

90a Germana Esperanto-Kongreso en Nürnberg, Germanio. Kongreso de GEA kaj festo okaze de la 125-a jubileo de la Nuernberga Esperanto-grupo. Informo: <http://www.esperanto-nuernberg.de>

18 – 20 majo

10-a MEKARO—Mez-kanada renkontiĝo de Esperanto en Otavo, Ontario, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Okazas vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracio, ktp. Informo: <http://www.mekaro.ca/>

7 – 10 junio

108-a (!) Skota Kongreso de Esperanto en Linlithgow, Skotlando (inter Glasgow kaj Edinburgh). Partoprenu la plej altan kongresnombron en Esperantio kun esperantistoj el Skotlando kaj aliloke en agrabla etoso, kun bunta programo inkluzive viziton al historirika Linlithgow-Palaco, naskiĝejo de Maria Stuart, kaj krozeton en la Unuiĝo-Kanalo. Informo: <http://bit.ly/R3MMxh>

26 junio – 5 julio

Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) ĉe la Universitato William Peace en Raleigh NC. Informo: <http://esperanto.org/nask/>

5 – 8 julio

Landa Kongreso de Esperanto-USA ĉe la Universitato William Peace en Raleigh NC. *La jarkunsido de AAIE okazos kadre de la landa kongreso.* Informo: <http://e-usa-kongreso.org>

12 – 18 julio

Konferenco de ILEI. Temo: “Instruado de Esperanto al ĉiuj aĝgrupoj”. Loko: Herzberg, Germanio. Informo: http://www.ilei.info/novajxo/unua_komuniko2013.php

20 – 27 julio

98-a Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavík, Islando. Informo: http://uea.org/kongresoj/uk_2013.html

3 – 10 aŭgusto

80-a Itala Esperanto-Kongreso en Castellaro apud San Remo. Prelegos inter aliaj Humphrey Tonkins kaj Paul Gubbins. Informo: <http://kongreso.esperanto.it>

19 - 26 aŭgusto

69-a Internacia Junulara Kongreso ĉe Kibucu Afikim (proksime de la Lago de Galileo), Israelo. Informo: <http://www.esperanto.org.il/ijk2013.html>

15 decembro

Naskiĝtago de d-ro L.L. Zamenhof

Bv informi nin pri aliaj aranĝoj. Pli aktuala kalendaro troviĝas ĉe <http://aaie.us>. Por granda listo de Esperanto-aranĝoj tra la tuta mondo vidu la retpaĝon <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>.

Informoj kaj invito al la 46-a Konferenco de ILEI en 2013

Temo: Dumviva lernado: Instruado de Esperanto al ĉiuj generacioj

Datoj: 12-18 julio 2013, semajnon antaŭ UK kun posta vetureblo al Rejkjaviko, Islando.

Konferencurbo: Meze de Germanio, Esperanto-urbo Herzberg am Harz, urboparto Sieber. Tiu alloga urboparto de Herzberg am Harz (ekde 2006 oficiale: la Esperanto-urbo) kuŝas en idilie bela valo de la Harz-montaro.

Loĝado kaj manĝoj: En 3-stela Esperanto-hotelo kaj restoracio Zum Pass, Haus Iris kaj en feriodomoj.

Konferencejo: Komunuma centro de la vilaĝo, kapabla akcepti 150 personojn, kun podio kaj bufedo. Krome uzblas lernejoj klasĉambroj en tuja apudeco. Ĉio en Sieber estas facile atingebla piedirante.

Transporto: de ĉiuj grandurbaj flughavenoj (ekz. Frankfurt, Dortmund, Berlin, Hamburg, Hannover, Leipzig) per trajno ĉ. 3-4 horoj; ene de Eŭropo kaj en Germanio per oftaj rapidtrajnoj.

Konferenca temo: La loĝantaro en multaj landoj maljuniĝas. Kulturaj kaj klerigofertoj por ĉiuj generacioj aperas ekz. en la eŭropa 'Dumviva Lernado' programo, el kiu ankaŭ Esperanto-projektoj ricevas subvenciojn. Kion ni lernu el tiuj projektoj? Kiun strategion ILEI ellaboru kaj sekvu, kiujn metodojn ni uzu por realigi Esperanto-instruadon de frua infanaĝo ĝis la t.n. tria generacio? Kiel ni kunlaboru kun neesperantistaj fakaj asocioj, institucioj, ktp.?

Kotizoj: **A:** Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B. **B:** Iamaj socialismaj landoj de orienta Eŭropo; ĉiuj landoj de Afriko, Latinameriko kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj la Korea Respubliko).

Aliĝperiodo	ĝis 31.03.2013		ĝis 30.06.2013		post 30.06.2013	
Aliĝkategorio	A	B	A	B	A	B
ILEI-membro	50 €	30 €	60 €	35 €	70 €	45 €
Ne ILEI-membro	65 €	40 €	75 €	45 €	90 €	55 €
Junulo, handikapulo	25 €	15 €	30 €	20 €	35 €	25 €

Rabatoj: kiuj pagas ĝis 31.12.2013 pagas jene: A – 40 EUR, B – 25 EUR.

Premiaj rabatoj: 50% por la 50-a kaj 100% por la centa aliĝintoj.

Loĝado, manĝado, ekskursoj kaj aliaj servoj pagendas aparte.

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) – la plej granda ILEI-sekcio, kaj Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo invitas vin!

Ĉu vi sciis – la lasta ILEI-konferenco en Germanio okazis en 1974. Tempo reveni.

Kiel el Herzberg mem, multaj ŝildoj aperas ankaŭ en Esperanto



American Association of Teachers of Esperanto

COURSE REPORT FORM

INSTRUCTOR

Name Address _____

Email address _____

COURSE

Location _____

Tuition cost _____

Level: Elementary _____ Intermediate _____ Other _____

Beginning and ending dates _____

Number of lessons _____ Duration of each lesson _____

Material used: Books _____

Videos _____

Other _____

STUDENTS

Number finishing course _____ Age range _____

Previous language skills _____

Is the course shown in the student records? _____

Was an AATE exam administered? _____

FORMATION OF CLASS

Name of organizer _____

Publicity method used _____

Supplier of course materials _____

COMMENTS OF INSTRUCTOR

Concerning publicity

Concerning materials

Concerning teaching

Please return this form to:

Gary Anderson
6545 17th Avenue N.W.
Seattle WA 98117-5517

E-mail: ganderson@SeattleAcademy.org

You can also report your teaching on our website at <http://aaie.us> (select “Raporti kurson” from the menu).

American Association of Teachers of Esperanto

MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME _____ PHONE () _____

ADDRESS _____

CITY. STATE _____ ZIP _____

E-MAIL ADDRESS _____

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

___ My telephone number ___ My e-mail address ___ Other _____

NAME & ADDRESS OF SCHOOL _____

Are you a professional educator? ___ Yes, active ___ Yes, retired ___ No

Memberships are for the calendar year. If you join in the middle of the year, you will receive “Bulletins” previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

Please check one membership category below:

___ One year membership with publications by mail in paper form: \$50

___ One year membership with publications via the Internet in PDF form: \$25

Membership for which calendar year? 20___

___ New ___ Renewal Today's date: _____

I enclose \$ _____ as a donation to AATE.

Total enclosed: \$ _____.

Please make your check payable to “American Association of Teachers of Esperanto” or “AATE” on a U.S. bank in U.S. dollars and mail it together with this form to Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521. To join on line and pay by credit card, visit <http://esperanto-usa.org/retbutiko>